Terpomo

Terpomo (*Solanum tuberosum*) estas grava kulturplanto de la homaro. La tubero de la planto enhavas la nutran amelon grandkvante.

La planto venis en la 16-a jarcento el Sud-Ameriko. Konatigis ĝin en Eŭropo Charles de l'Ecluse. Sed longtempe ĝi estis uzata nur por nutri gregojn.

La historio de la terpomo komenciĝas en la montaro de Andoj, ĉe la lago Titikako inter la teritorioj, kiuj nuntempe estas Bolivio kaj Peruo antaŭ 8 000 jaroj. Tie komunumoj de ĉasistoj kaj kolektantoj enhejmigis ĝistiamajn sovaĝajn vegetalojn de terpomo, kiuj abundis ĉirkaŭ la lago. En Eŭropo oni ekkonis terpomojn unue en la Kanarioj kaj poste en Hispanio en 1526, post kiam Pizarro konkeris Peruon. Dekomence oni ne manĝis tiun tuberon en Eŭropo, ĉar oni konsideris ĝin taŭga nur por gregoj kaj por malriĉeguloj; paradokse la nobelularo ja miris pri ĝiaj floroj. En kelkaj lokoj oni eĉ kredis, ke terpomo estas venena.

Nur post Granda malsatego en Irlando kaj en aliaj lokoj oni komencis uzi ĝin por normala homa nutrado. De Eŭropo la terpomo pasis al Hindio, al Japanio kaj ĉien ajn. Nuntempe oni kultivas terpomojn sur areo de ĉirkaŭ 195 000 kvadrataj kilometroj. Laŭ Unuiĝintaj Nacioj la terpomo estas la kvara nutraĵo plej konsumata en la mondo kaj UN volas dediĉi la jaron 2008 al eventoj pri tiu tubero.

Kvankam la deveno de la terpomo estas en la Andoj eblas manĝi detieajn terpomojn en Eŭropa Unio nur se ili estis prilaboritaj. Eŭropunia regularo malpermesas importadon de la freŝa terpomo el Andoj, kvankam eblas importi ekzemple vinberojn aŭ aliajn fruktojn el Ĉilio, Ekvadoro aŭ aliaj sudamerikaj landoj.

Ekzistas 3 840 variantoj registritaj nur en Peruo de ĉiu koloro (flava, oranĝa, purpura, ruĝa, blua... eĉ kun desegnoj) kaj de ĉiu formo (longaj, rondaj anasaj, ktp.). En la tuta anda regiono estas ĉirkaŭ 5 000 variantoj kaj sep specioj.

La terpomo estas riĉa nutraĵo. Ĝi enhavas multe da karbonhidrato kaj la plej altan procentaĵon da proteinoj inter tuberoj kaj radikoj, ĉirkaŭ 2,1 %. Krome ĝi havas multe da vitamino C. Nur unu terpomo enhavas duonon de la manĝaĵo bezonata en unu tago kaj kvinonon de la bezonata kalio.

Retpaĝo: www.traduki.de
Teksto: eo.wikipedia.org/wiki/Terpomo